

De la unuaj infanlibroj al la kontribuo de Svislando

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-820/286, 1979 junio 28 kaj 30

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-42/SRI-1979-42-A-1-286-820-1979-06-28-30-Claude-kaj-Andree-Gacond-De-la-unuaj-infanlibroj-al-la-kontribuo-de-Svislando.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

Esplorado pri la origino de la infanlibroj kondukas nin malantaŭen en la tempon ĝis la 17-a jarcento.

A.- Tiam porinfana literaturo kaj bildlibroj ne jam ekzistis. Tamen jam ekzistis, kiel antaŭuloj al la infanlibroj, popularaj bildserioj instruaj, kiuj unue celis la plenkreskulojn, sed kiujn la infanoj ŝatis kolekti. Tiuj bildoj, nomitaj "Saints" en la franca, "Santos" en la hispana kaj "Helgen" (de "Heilige Bilder") en la germana, plenumis antaŭ ĉio religian funkcion. Ili predikis favore al la konservo kaj kreskigo de la katolika fido.

Cl.- Sed baldaŭ eldoncentroj fakiĝis en la publikigo de simple instruaj kaj profanaj bildserioj. Tiurilate Svislando ludis pioniran rolon. En Zürich ekaperis en 1645 la rapide famiĝintaj "Neujahrblätter" (novjaraj folioj). La Urba Biblioteko de Zürich ekdisdonis tiujn ĉi novjarajn foliojn je kristnasko anstataŭ la tradiciaj kukoj kaj vino. Rapide multaj komunumoj kaj societoj sekvis tiun ĉi ekzemplon kaj la novjaraj folioj fariĝis kolekt-objektoj.

A.- La unua intenco de tiuj "Neujahrblätter" estis ĉefe moraliga, sed baldaŭ aliaj temoj estis pritraktitaj. Aperis bildfolioj edukaj, juraj, historiaj, sciencaj, ludaj aŭ religiaj. Ilin pretigis talentaj artistoj kiel Conrad, Johannes Mayer, Herrliberger, Götz, Füssli kaj Schellenberg.

Cl.- Ekde 1657 alia urbo ol Zürich famiĝis rilate al la eldono de bildfolioj. Ĝi estas Epinal en Francio. La « Centre d'Epinal » aperigis siajn seriojn de "Imagerie populaire" (populara bildaro). Poste en Nürnberg kaj München la presejo Neu-Ruppin ekeldonis siajn "Bilderbogen". Tiuj bildaroj havis sian eldonan apogeon en la mezo de la 19-a jarcento.

A.- Sed la eldono de bildserioj sub formo de libroj ekde 1850 subite ĉesigis la aktivadon de la centroj, kiuj publikigis bildfoliojn. Estas interese, ke unu jarcenton poste la komercaj entreprenoj rekomencis eldoni bildseriojn por varbi al si la infanaron. Tiuj bildoj glueblaj aŭ kolekteblaj proponas la portretojn de la sportuloj aŭ alportas enciklopediajn konojn pri tekniko kaj pri veturiloj.

Cl.- La unua vera infanlibro estas la fama "Orbis Pictus" de la humanisto Jan Amos Komensky, aperinta en 1658. Apostolo de la moderna edukado, Komensky kredis, ke la homo estas senlime perfektigebla, kaj ke konsekvence la edukado devas kontribui al tiu spirita disvolviĝo.

A.- La verko "Orbis Pictus" estas originala enciklopedio ilustrita helpe de lignogravuraĵoj, kiuj estas vera muzeo de la homaj konoj en la komenco de la 17-a jarcento. Estas intime asociitaj la vortoj kaj la bildoj. La originalaj lingvoj estas la latina kaj la germana.

Cl.- Tiu asociigo de la tekstoj kaj de la bildoj estas unu el la geniaj intuicioj de Komensky. Li prave pensis, ke ĉio rakontata al la infanoj devas esti samtempe montrata. Kaj li ege zorgis pri la arta aspekto de la bildoj, kaj pri ilia enhavo.

A.- Tiu enciklopedio "Orbis Pictus" de Komensky multe favoris la disvolvon de la lingva instruado. Kaj Rousseau, Pestalozzi kaj Goethe, en siaj pedagogiaj verkoj, plurfoje esprimis sian senliman admiron por la enciklopedio de Komensky, kiu baldaŭ havis multajn posteulojn. Ni interalie menciuj la lernolibron "Elementarwerk" de Johann Rasedow, 1770, kaj la bildlibron "Pertuch's Bilderbuch", 1796. La enciklopedioj, kiuj multiĝas en nia epoko, atestas ke la ideoj de Komensky estis fruktodonaj.

Cl.- En la komenco de la 20-a jarcento la ideoj de Komensky, Rousseau, Pestalozzi kaj Goethe markis novan generacion da pedagogoj, kiuj ludis fundamentan rolon koncerne la teoriumadon favoran al la infanlibra eldonado. Maria Montessori, italino, Dewey, usonano, Decroly, belgo inspiris la francon Paul Faucher, kiu sub la pseŭdonomo "Le Père Castor" (la patro kastoro) kreis la albumaron "Albums du Père Castor" kaj poste direktis la koncernan eldonejon, kiu ekde 1927 ĝis 1967 publikigis pli ol 300 porinfanajn albumojn. Multaj hodiaŭaj plenkreskuloj akiris la plimulton de siaj konoj pri la naturo ne tra la lerneja instruado, sed per la atenta legado de tiuj albumoj dum la infanaĝo.

A.- La 17-an jarcenton rilate al la infanlibroj markis alia influo, tiu de Charles Perrault. En 1645 aperis liaj "Contes en vers" (fabeloj en versoj) kaj en 1695 la "Contes de ma Mère l'Oye" (fabeloj de mia Patrino la Ansero), rakontoj kaj priskriboj de la pasinta tempo kun moralaĵoj.

Cl.- Fakte Perrault ne verkis por la infanoj. Liaj fabeloj kaj rakontoj, kiuj, laŭ li, esprimas la sanan prudenton de la popolo, sin direktis al elita publiko sofismema, kiu frekventis la literaturajn salonojn en Parizo. Tiuj beletremuloj malamis la intelektan argumentadon. Kiam tiu ĉi modo ĉesis kun la malapero de tiu frivola publiko, la rakontoj kaj fabeloj de Perrault ne falis en la forgesojn. Ilin heredis kiel legantoj la infanoj. Tiam la verkoj de Perrault aperis sub la formo de ilustritaj libroj. Gustave Doré dediĉis sian talenton de gravuristo al la ilustrado de la tekstoj de Perrault.

A.- Sed sen la filozofia influo de Jean-Jacques Rousseau eble veraj infanlibroj ne ekzistis. Per siaj teorioj li permesis al la infanoj sociologie ekzisti. La mezepoka Eŭropo, kiel la klasika mondo kaj ĉiuj aliaj civilizoj, ne lasis al la infano la rajton ekzisti kiel infano. Tiam la infano ekzistis nur kiel etulo prilaborota laŭ la trudoj de lia kasto. Rousseau instruis, ke la infano havas propran vivon respektindan kaj kun eksterordinara viglo li predikis favore al la protektado de la infanaĝo, necesa fazo de la homa vivo. La disĉiploj de Rousseau, Pestalozzi kaj poste Fröbel, la patro de la infanĝardenoj, per siaj teoriaj eduk-principoj donis la metodologian fundamenton, kiun bezonis la porinfana literaturo. Ekde nun ĝi povas dinamisme disvolviĝi.

Cl.- Pri tio ni parolos la venontan semajnon. Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia pri la unuaj infanlibroj. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!